



Informoj:
Arto -- Literaturo
Turismo -- Sciigoj

NIA VIVO

Administracio
kaj Redakcio:
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS

LA INFANO

EL VÍCTOR HUGO (1802-1885)

Kiam venas l'infano, l'intima rondeto
Per ekkrio plaŭdas, l'okula flameto
La okulojn de ĉiuj flamigas;
Eĉ la frunto plej nuba, kaj eble plej ŝlima
Ofte brilas, tuj kiam l'infano senkrima
Frunton puran kaj ĝojan vidigas.
Ĉu la sojlo verdiĝas, ĉu frosta la vento
Ĉirkaŭ fajro disbrila, pro nova frostsento
Apudigas la seĝojn, siblante,
Kun l'infano la ĝojo kaj lumo aperas:
Rido! krio! alvoko! Nur Panjo esperas,
Ke ĝi, ho ve! ne falos paŝante.
Ni kelkfoje pritraktas, skuante la flamon,
la poetojn, la landon, en fin' la Diamon
Al la homo de l' preĝ'nobligita,
Sed l'infano aperas: for, lando! for, Dio!
Kaj poetoj! La pridiskutanto, ĉe tio,
Kun rideto mutiĝas, ravita
Kiam nokte ni dormas aŭ sonĝas, je l' horo
Kiam ĝemo el akvo, simile je ploro,
En la kanoj riveraj eliĝas;
Se subite levigas la flama tagestro
Ĉe l' sumbrilo, sur kampoj, en gaja orkestro
Sonoriloj kaj kirdoj vekigas
Vi ja estas tagiĝo; kaj mia la koro,
Ebenajo, sur kiun floreja odoro
El vi disvaporigas, etulo;
Mian koron malluman arbaron similas,
Kie sonas karesaj murmuroj kaj brilas
Orradioj nur por vi, karulo!
Viajn belajn okulojn dolĉeco senlima
Elplenigas; sur via maneto nekrima
Kuşas ĝojo, Dibeno, honoro;
Vi jam marŝis neniam sur tero ŝlimhava;
Sankta kapo blondhara, anĝelo plej rava,
Kun blindiga florkrono el oro.
Vi similas ĉe ni la kolombon de l'arŝo
Vi ankoraŭ ne havas la aĝon de l'marŝo,
Flugilparon vi havas lazura
Sen kompreno vi vidas la mondon. Perfekta
Kaj duobla virgeco! Ho, korp' sendifekta
Kaj animo neniel malpura!

Bela estas l'infano kun dolĉa rideto,
Sincerulo, kaj tiel pretenda voĉeto,
Floroj tiel facile ĉesantaj,
Kun ravata vagado kaj disrigardado
Prezentante l'animon al la ekzistado
Kaj la buŝon al kisoj bruantaj.
Bona Dio min gardu kaj miajn amikojn,
Kiajn fratojn, parencojn kaj eĉ malamikojn,
Hontoflagon portantajn en mano.
Iam vidi someron sen floro ĝardena,
Vidi kaĝon sen bird', abeluĝon malplena
Kaj la domo, ho ve! sen infano!

El la franca lingvo tradukis,
G. PHILIPPET.

NOVAJ HEBRIDOJ

ĈE LA KANIBALOJ

Sur la marbordo de insulo Malikolo, iu el
Novaj Hebridoj en Oceanio, loĝadas la sovaĝaj
gentoj nomataj Bignamboj, kanibaloj, kontraŭ
kiuj estis devigataj bataladi la eŭropaj kolonianoj
multe pli danĝere, ol meze de rabbestoj.

La moroj de la bignamboj estas tiel kruelsova-
ĝaj, ke ŝajnas preskaŭ nekredeble, ke ili ankoraŭ
persistas.

Kiam la bignamboj sukcesas kapti blankulon
aŭ kanakon (indiĝeno de Polinesio) laborantan
kun la blankuloj, ili tuj mortigas kaj dispartigas
lin. Poste ili sendas donace al la estroj de la
najbaraj gentoj brakon, kruron aŭ alian bongus-
tan homparton. Se la estro akceptas, kaj li ne
rajtas ja rifuzi, li sin per tio devigas redoni bal-
daŭ similan donacon. La tuta gento restas mal-
kvieta, ĝis kiam ĝi sukcesos havi alian homĉa-
sajon.

Ankaŭ okazas ofte, ke gestrestro deziras fes-
teni kaj por tio li destinas iun el siaj regatoj. Ĉi
tiu baldaŭ estas buĉata kaj rostata en kanaka
forno sur ŝtonoj varmigita ĝis blankardeco. Kel-
kaj estroj estas ja tre frandemaj. Tiu de insulo
Aoba, proksima al insulo Sankto multege ŝatas
manĝi knabinajn mametojn.

Foje la maro puŝis ĝis la bordo de Malikolo
ŝipan foston, kiun kaptis bignamboj kaj ĝin portis
por donaci al najbara gentestro. Ili grandpompe

plantstarigis ĝin meze de la budaro. De tiam ambaŭ gentoj militadas unu kontraŭ la alia. Tio ĉi daŭros, ĝis kiam la donacintoj ricevos similan donacajon. Por liveri ĝin al si la gentanoj, kiuj ja scias tion, dum la tuta tago spionas la velŝipojn kaj ne hezitos murdi ŝipanaron por forporti la sopiratan foston kaj ĝin feste porti al la najbaroj.

La vilaĝoj de la bignamboj konsistas el labirinta intermiksiĝo de budoj kaj palisaroj. Meze staras la ĉefa budo, kie loĝas la estro. Se fremdulo alvenas en la centran parton de budaro, li jam ne plu povos eliri sen gvido de gentano, ĉar certe li ne trovos la ĝustan elirvojon. Se tiam li estas atakata, li malfacile povos sin defendi kaj fine pereos.

Kiam bignambo konscias, ke li maljuniĝas, kunigas ĉirkaŭ si siajn familianojn, disdonas sian havajon, oferas sian lastan porkon kaj fine li ordonas, ke oni enterigu lin vivantan.

Ĉi tiu nur estas iu el facetoj de tiu animo tiel proksima al la besteco (&) kaj kiu de ni estas ja neklarigebla mistero. Iu el ĝiaj plej impresigaj strangaj konsistas el la kapablo morti per memsugestio. Se homo, laŭ antaŭdiro de alia havanta pli fortan volon, ol li, estas baldaŭ mortonta, li memsugestias sin, malfortikiĝas iom post iom kaj mortas. Tia sugestio influas eĉ de malproksime kaj la nedudeblaj anekdotoj pri tio ĉi estas ja terure impresigaj.

Per tio estas klarigebla la granda influo, kiun kaŭzas iuj misiistoj sur ilin kaj la timego, kiun ili inspiras. Se iu el ili diras, ekzemple, al kulpa junulo: «Dio punos vin kaj vi mortos...» la morto preskaŭ nepre okazos, ĉar, malgraŭ tio ke ĝi ŝajnas treege stranga kaj mistera afero, la bignamboj kapablas morti mem vole, kvazaŭ en ili ne plu ekzistus vivforto.

Tiel danĝeraj, kiel la bignamboj loĝantaj ĉe la okcidenta marbordo, estas la smallnamboj, kani-baloj de la orienta marbordo. Ĉiuj ambaŭ ne surportas vestaĵojn, sed nur kaŝtukon pli malpli grandan, el kio devenas iliaj anglaj nomoj: «big-granda; small-malgranda; nambo kaŝtuko.

Jen kiel priskribas sian unuan renkontiĝon kun la kani-baloj Fino Sauvy:

«Ni transpasis la markolon Bougainville, jetis ankron kaj la motorboato portis nin teren, en la insuleton Vao.

La espektaklo estas eĉ pli emocia, ol tio, kion ni imagis:

Sur malvasta, sabla marbordo ĉirkaŭanta tre longajn, indiĝenajn trunkbarkojn estas kani-balagento. Ili ne surportas vestaĵojn. Iliaj vizaĝoj estas ja teruregaj kaj aspektas tiel nekonscieble

kruelbeste, ke oni ne facile forgesas ilin. Mute kaj nemeve ili rigardas, kiel ni elboatiĝas, pretaj forkuri de fotografaparato aŭ eksalti kvazaŭ rabbestoj kontraŭ tiuj, kiuj kuraĝus ilin tuŝi. Farante al si pasejon inter ili venas pastro Godefroy, kiu iras pene, ĉar li suferas pro elefantiazo. Pastro, mariano, Godefroy de antaŭ dekok jaroj loĝas ĉe la kani-balaj gentoj de Novaj Hebridoj. Li parolas ilian lingvon kaj scias trudi respekton al si sufiĉe por ne esti manĝata de ili. Tuj poste ni vidas lian mizeran, fumonigran budon, en kiu por eniri estas necese sin fleksi kaj kie post kutimiĝo al ĝia mallumo oni rimarkas, ke estas eĉ nek plej malgranda meblo sur ĝia prembatita terplanko. Kiam mi sciigis al li mian miron pro tiu ĉi danĝera kaj terura fakirsoleco, li respondis tre simple al mi: «Kiam la tempo estas tro peze teda mi legas Virgilion».

Sub stangtenata tegmento el kokosfolioj kuŝas indiĝena barketo duonmanĝita de insektoj. Antaŭ kelke da tempo kelkaj junaj indiĝenoj, kiuj estis ĉe la mar bordo loĝata de la kolonianoj, allogate de mongajno transportis en sia trunkarbeto blankan malsanan virinon. De tiam la barketo estas malbenita. Neniu ĝin tuŝos iam ajn estonte.

Estas en la mondo neniu popolo pli multe malsatanta la virinon, ol la smallnamboj. Por la virino estas malpermesate: ke ŝi eniru en kelkajn budojn, ke ŝi iru laŭ iaj vojetoj, ke ŝi partoprenu la religiajn festenojn, la ceremoniajn dancojn, ke ŝi manĝu virporkon. Ĉe Aoba virino ne rajtas rigardi sian fraton, nek ŝia frato levi al ŝi siajn okulojn, se li ne volas esti mortpunata. Tie ĉi en Vao ili surportas simplegan vestaĵon konsistantan el mallarĝa fibroplektaĵo. Ĉe Sankto, kien ni alvenos morgaŭ, ili surportas antaŭe folion el mamananbué' on samgradan, kiel mano, kaj alian, similan, poste. Ambaŭ folioj estas tenataj de kokosfibro.

Ĉirkaŭ mi la virinoj proksimiĝas, kvazaŭ scivolemaj bestoj. Ŝajnas ja neeble, ke ili inspiras aliajn sentojn krom teruro kaj naŭzo. Kelkaj portas ĉirkaŭ sia kolo aŭ talio ringojn el vitraj multkoloraj eroj. Ĉi tiuj ringoj estas nomataj «por Trakti» tial ke ili estas uzataj komerce de la indiĝendungantaj ŝipistoj.

Multaj viroj, el kiuj ĉirkaŭas nin kun miksaĵo el scivolo, el malkonfido kaj malico, estas armitaj: kelkaj per Schneider karabeno, aliaj per pafarko kaj venensagoj. Ĉi tiuj lastaj finiĝas per akrepinta, homa ostoj: unue ili ŝmiras ilin per rezino el panarbo kaj poste oni trempas ilin en putrantan viandon. Lertejetita sago penetras tri aŭ kvar centimetrojn en la korpon de la malamiko kaj, ĉar pro sia propra pezo ĝi emas fali, la vundo grandiĝas kaj la venenportanta pinto rompiĝas. La vundito rapide mortas pro tetano.

(&) N. de T.—Neiel la bestoj estas favorataj per tiu komparo.

Ni iras al la insulinterno. Iu post la alia intermiksate kun silentaj indiĝenoj ni iris meze de la sovaĝkreskajaro, sub grandaj arboj, laŭ mallarĝa vojeto, kiu kondukas nin ĝis budaro ĉirkaŭata de muroj, kiujn ni transiras por iri en ĝin. Tie oni vidas kelkajn naŭzige malpurajn budojn sen iu ajn meblo. Kiam mi rigardas iun smallnambon, el tiuj ĉirkaŭantaj nin, mi ne povas eviti ekstremon pro lia kruelestima vizaĝo, kiu mienas malicon kaj rabemon.

Tradukita de
RAMÓN DE SALAS.

(Daŭrigota).

PRIVATA SEKRETAREJO

EL LUIS TABOADA

—Ĉu oni povas vidi sinjoron ministron?

—Ne, sinjoro.

—Kaj lian privatan sekretarion?

—Ankaŭ ne.

—Nu! Faru al mi la favoron porti al li avizon...

Diru al li ke mi estas Risueño.

—Mi diris al vi, ke li ne ricevas.

La pretendanto apartigas sin mallevante la kapon, kaj la sekvantan tagon li revenas al la ministrejo, kie la pordisto fermas al li la enpaŝon por demandi al li:

—Kion vi deziras?

—Mi volas vidi la ministron.

—Li ne ricevas.

—Kaj la sekretario?

—Mi ne scias... Kiel vi estas nomata?

—Risueño, mi jam diris ĝin al vi hieraŭ vespere.

—Ĉu vi kredas ke mi povas rememori ĉiujn nomojn de tiuj, kiuj venas tien ĉi postuli?

—Ne koleru.

—Bone, mi portos avizon al la sinjoro privata sekretario.

—Mi restas danke.

La pretendanto sukcesas eniri en la skriboĉambro de la oficisto kaj tiu ĉi direktas al Risueño profundmalŝatan rigardadon akompanatan de tiu ĉi demando:

—Vi diros al mi tion, kion vi deziras.

—Mi venas ĝeni sinjoron ministron pri grava afero.

—Mi estas Risueño, Estirado, Rubio, kaj Kompanio, de San Feliu de Guixols, posteuloj de Ripoll, Moll, Fenoll fratoj.

—Estu mallonga.

—Ni havas magazeton de pura linfaruno kaj ni provizas ĉiujn civilajn kaj militistajn hospitaloj...

—Al la greno, al la greno.

—Al kia greno?

—Hal... La Ministraro devas al ni sesmil kvincent duojn je kataplasmoj kaj aliaj du mil kaj pli

je linfaruno. Ni prezentis dekdu fakturojn de Mar-
to, kaj...

—Kaj kio?

—Nenio; ke mi venas plendi al la ministro.

—Kaj vi kredas ke la ministro ne havas aliajn aferojn pli gravajn pri kiuj pensi? Ĉu vi supozas, ke en tiuj ĉi altaj destinoj de la publika administracio oni povas agi laŭ la individua konveno de tiu ĉi aŭ de alia kavaliro? Mi ne vidis genton pli senkonsideran ol vi la industriistoj.

—Kiel?

—Mi ne povas perdi la tempon. Faru noton pri viaj aspiroj.

—Mi kunportas ĝin redaktata.

—Bone; lasu ĝin tie kaj sinjoro ministro decidus.

Risueño, Estirado, Rubio kaj Kompanio lasas la noton sur la tablo kaj eliras el la oficejo kun la oreloj kiel du ruĝaj piproj, dum la sekretario lasas sin fali sur sofonaŭto dirante solene:

—Ke eniru alia.

Alia pretendanto eniras kun granda timemo kaj ne scias kie meti siajn manojn, nek sia ĉapelo, nek siajn kruojn...

—Mi venas vidi sinjoron ministron... ministron..., ĉar mi estas naskiĝinta en la provinco... provinco de Burgos kaj li estas ankaŭ... ankaŭ li estas naskiĝinta en la provinco... de Burgos...

Estas tia la mallerteco de la pretendanto, ke li lasas fali la brakon sur la rondatableton kaj renversas ĝin; li volas levi ĝin kaj faletas kun apogseĝo; li perdas la ekvilibron kaj falegas sur la sekretarion. Tiu ĉi plenkolera, diras:

—Tion kion unue oni bezonas por veni al tiuj ĉi altaj centroj, estas havi bonajn manierojn. Kiu ordonis al vi subteni vin en la ronda tableto?

—Mi supozis...

—Oni konas ke vi ne estas alkiutimiĝinta vidi delikatajn meblojn.

—Pardonu min.

—Tion kion vi scias fari estas impertinenti per ridindaj petoj.

—Kion vi volas de la sinjoro ministro? Ke li donu oficon al vi? Do tio ne estas ebla. Ĉu vi kredas ke pro naskiĝo en la provinco de Burgos jam vi havas rajton al lia bonvolo?...

En tiu momento la sonorileto de la ministro sonoras kaj la sekretario ekkuras rapida kiel sago, al la oficejo de la supera ĉefo.

Tie, la rigardo de la kolera sekretario akiras aspekton de humileco vere serafa; rideto de dankema servanto desegniĝas sur lia buŝo.

—Ĉu vi vokis? Li demandas per dolĉega tono.

—Jes; netigu tiun leteron kaj havu multan zorgon pri ortografio. Se ia «ho» mankas, vi metu ĝin, ĉar mi ne povas min malaltigi per tiuj malgranda-

joj... Ha! Kiam vi eliru, iru vidi ĉu oni gladis al mi la ĉapelon, ĉar eble mi devos surmeti la uniformon.

La sekretario klinigas sin kaj eliras tra la por-do, sed antaŭ ol eniri alian fojon en lian oficejon, li reakiras la malhumilan geston kiu tiel timigas la pretendantojn...

«Neniu estas pli malhumila ol la humila, kiam oni metas antaŭ li skribotablon».

El hispana lingvo tradukis,

FRANCISCO L. CAMPOS.

Parras de Castellote (Teruel) (el la Rondo de naciaj instruistoj).

PRI LA JAMBOREO DE 1933

—Eble vi, kara leganto, iam aŭdis aŭ legis pri la Ĵamboreo okazonta en Budapeston la proksiman someron. En la esperantistaj revuoj ofte oni donis klarigojn pri ĝi. Sed mi pensas, ke vi ĉiam demandis al vi pri la signifo kaj mezuro de tiuj skoltaj elmontraĵoj. Mi intencas helpi vin iomete.

—Mi pensas, ke vi certe konas la skoltan movadon. Klarigi al vi kio estas kaj kion faras la skoltoj estus neutila. Do, mi enkondukos vin en la aferon.

—La skolta movado estas tute internacia. Ĝi estis akceptata de 50 diversaj landoj. Tri milionoj da skoltoj estas en la tuta mondo. Kaj tiuj skoltoj okazigas kvarjare grandegan Tendaregon kiu kunigas ilin por fratigi dum kelka tempo. Tiuj tendaregoj estas nomataj Ĵamboreoj. La unua okazis en Londono la jaron 1920. En 1924 okazis la dua en Copenhague, Danlando. Kaj la trian efektivigis la anglaj skoltoj en Arrovre Park, Birkenhead, apud Liverpool en la jaro 1929. Por ke vi imagu pri la graveco de tiuj skoltkunvenoj mi nur diros ke la tria Ĵamboreo kunigis pli ol 60.000 skoltfratojn.

—En tiu ĉi Ĵamboreo oni montris la utilon de uzado je internacia lingvo inter skoltoj. «Skolta Esperantisto Ligo» okazigis apartan tendaron kiu estis sukcesa. La semo estis disjetita. Baldaŭ, ĝi donos frukton.

—De la 2.^a ĝis la 16.^a de Aŭgusto okazos en Godollo, apud Budapesto, la kvara Ĵamboreo. La nombro da skoltoj tendarontaj ne estos tiel granda kiel en 1929. La nunaj cirkonstancoj malhelpas la entuziasman laboron. La tuta mondo suferas grandan krizon kiu ege influos la partoprenon.

Oni atendas pli ol 30.000 skoltojn. Pri la vidinda grandeco de la skolta mondkunveno donas interesajn imagojn la jam konataj projektoj; la devizo de la tendarego estos la evoluo de la skoltmaniero kaj la modelaj tendaroj. Entute estos dek subtendaroj kaj unu gasttendaro por apartaj skoltligoj kaj itala junularo.

—Oni konstruos, inter aliaj, apartaj profundputojn, banejojn, poŝtofojejon (la lasta Ĵamboreo havis trafikon de preskaŭ 250.000 poŝtajoj dum du semajnoj) apartan telefoncentrejon kun 60 stacioj por la tendara skoltpolicaro, apartan mallongdanan radio-stacion, tendaron por ĵurnalistaro tendaran hospitalon, stacion por unua helpo,

ĉiuspecajn vendejojn, aŭtomobilparkon, internacian bankon, aeroplanojn, ktp.

La festa salutmarŝo de la skolttrupoj daŭros 2 horojn, dume ludos 5-6 orkestroj interŝanĝe. Por rigardi Budapeston ĉiutage 1.500-2.000 skoltoj ekskursos en la ĉefurbon kaj sama nombro en la provincajn vizitindajn lokojn. Al apartaj maĝejoj potage 6.000-10.000 skoltoj estos transportataj 200 ope, trifoje tage.

Ankaŭ okazos la unua, skolta, internacia, senmota aeroplan-konkurso, oficina tendaro, kunveno de skoltfederaciaj delegitoj.

—Mirinda estos multkolora aspekto de la Tendarego. Tie oni povos rigardi la plej strangajn morojn kaj civilizaciojn kunigitajn per nur unu celo. Homara kunfrateco! Ja, neniu povas fieri pli ol la skoltoj pri tio ke ili iris plej malproksimen rilate al mondpaco.

Vespere, ĉe la «tendarfajro» okazos skoltaj prezentadoj, ĥorkantadoj, skoltludoj, dancoj, ktp.

—Vera, malofta okazo por rekoni la neceson de helpa lingvo internacia. La «S. E. L.» vikle laboradas pri tio. Hungara, Belga kaj Litova Skolta-socioj oficiale rekonis la lingvon kaj sukcese laboras inter ĝiaj skoltoj. Ĝiaj skoltrevuoj klarigas kursetojn pri la lingvo. En Norvegujo dum tiu pasinta vintro oni intruis pri la lingvo la skoltojn partoprenontajn. Simile en Anglujo, Ĉeĥoslovakujo, Portugallando, ktp.

—Ĉiujn homojn interesos tia renkontiĝo de progresema junularo kaj similtensa, idealista gvidantaro, malofta en mondhistorio.

A. PEDRO MARQUETA.

SCIIGOJ

S-ro Soler y Valls estis destinita kiel telegrafestro al la «Centro de Madrid». Tiu klera samideano aperigis novan eldonon de lia bona kaj praktika gramatiko, kiu, sendube atingos la saman sukceson kiel la antaŭaj eldonoj. S-ro Soler ankaŭ preparas eldonon de malgranda gramatiko por lernigi Esperanton en lernejoj.

Nia valencia samideano S-ro Caplliure preparas eldonon de nova gramatiko kun vortaro, kiu pro la lerteco de la aŭtoro, ni kredas estos grava esp. lernolibro.

La esperanta grupo «Valencia» trafis gravan sukceson per sia stando ĉe la Internacia Foiro ĵus okazinta en la belega ĉefurbo de l' Turia. En tiu stando niaj samideanoj ekspoziciis anoncojn pri ĉiuj fojroj kiuj uzas Esperanton, lingvo oficiale adoptita de la Internacia Unuigo.

La Esperanta Movado en Cheste daŭrigas senĉese sian antaŭeniron; ĝi eniras kaj disvastigas ĉie ĝis la Urbestrejo, tie S-ro Rafaelo Vidal, urbestro, jam estas membro de Ateneo; li jam partoprenas en la esperanta agado kaj li estas alia ero, kiu antaŭenpusas la movadon. Ni tutkore gratulas lin kaj instigas por ke li protektu la esperantistojn entuziasmaj de lia urbo.